

Numero: 284.
Januaro: 2016.

24-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Nova jaro, nova espero.

Kion skribi pri la nova jaro 2016? En la unuaj tagoj, semajnoj oni esperas kaj kredas la nuna estos pli bona, pli rezultoplena, ol la pasinta.

Ĉmondo milito, hombuĉado. Ĝi malfaciligas nian vivon.

Estus bone esperi, ke ĉio estas nur malbona sonĝo. Vekiĝante ni forgesos ĝin.

Ve ne, ĉar gazetoj, radio- televidoelsendoj estas plenplenaj de tiaj teruraĵoj.

La migrantoj invadis nian oldan kontinenton. Nun mi ne deziras skribi, ke ĉiuj migrantoj estas teroristoj. Eĉ ankaŭ stultulo vidas, ke tiu ĉi popolmigrado estas bone organizita. Kiuj ekirigis tiun ĉi malfeliĉan homamason, tiu havas sekretan celon pri Eŭropo. Ili planas intermiksi la praloĝantaron kun alikulturaj homoj por ke sur tiu ĉi tereno estu ĥaoso.

Mi jam aŭdas la kontraŭantojn: Tio ne estas vera. Ni nepre devas helpi la rifuĝantojn de militoj kaj malfacila vivo.

Jes, ni devas helpi ilin, sed ne tiel, ke ni translokigas la tutan loĝantaron.

Laŭ mi ĉiu homo devas lukti por sia patrujo kaj hejmo. Mi scias, tiu ĉi lukto bezonas ofertojn. Homoj mortas, eĉ mortos, sed fine kiu vere amas sian patrujon kaj popolo venkos.

Ne estas vere, ke ni hungaroj estas kontraŭ aliaj nacioj kaj ni enfermiĝos de la problemoj.

Rememoru pri la rumana revolucio kaj la sudslava milito. Tiam la hungaraj homoj unuanime akceptis, helpis la tieajn homojn (ne nur hungarojn). Milioj da rumanoj kaj serboj trovis rifuĝejon de la bomboj kaj sangaj bataloj en Hungario ĝis la milita situacio mildiĝis kaj ili povis hejmeniri.

La nunaj rifuĝantoj (pardonu min migrantoj) por ĉiam deziras resti en Eŭropo. Ili estas delogitaj, en niaj landoj eĉ ankaŭ oni ne devas labori. Sen laboro oni povas vivi, kiel reĝo.

Malgraŭ tio, ni esperu, la nova jaro 2016 estos bona kaj paca. Estu tiel kaj ankaŭ, Esperanto prosperu!

-Redaktanto-



Lingvolernejoj

Nuntempe la lingvolernado estas tre moda en Hungario. La gazetoj estas plenaj de anoncoj por lerni iun lingvon, ĉefe la anglan.

Kion oni aŭdas en la radio kaj televido? La angla estas la unusola lingvo, kiun ĉiu homo devas lerni kaj scii. Sen tiu ĉi lingvo oni jam ne povas ekzisti.

Ĉu vere?

Laŭ mi multaj homoj estas misgviditaj kaj trompitaj.

Mi ne kredas, ke ĝi estus nur la LINGVO, kiu meritas la lernadon.

Fakte ĝi estas vaste disvastiĝinta sur la tuta terĝlobo. Multaj homoj parolas ĝin. Sed neniu pensu, ke per aliaj lingvoj ne eblas orientiĝi en la mondo.

La angla dependas la politikaj situacioj. Ĝian privilegecon ĝi akiris perforte. Sur diversaj kontinentoj oni divastigis ĝin per glavo. Multe da sango fluiis pro ĝi.

Mi bone scias, estas kiuj diras pri mi, ke mi estas la malamiko de la angla lingvo. Mi ne parolas ĝin kaj pro tio mi kontraŭas ĝian uzadon.

En mia vivo mi provis ellerni kelkajn lingvojn. En la lernejo mi lernis devigite la rusan. Tiam oni sugestis al ni, ke tiu ĉi lingvo post kelkaj jardekoj fariĝos la unusola komunikilo de la pacama homaro. Oni ne kontraŭis la lernadon de aliaj mondlingvoj, angla, franca, germana ktp., sed vole nevole tie ŝvebis en la aero, tiuj ĉi estas la lingvoj de la kapitalistoj, kiuj kruele subpremas la laboristaron. Do, ĉiu socialista homo devos ellerni la rusan lingvon, ĉar ĝi alportos por ni la mondliberecon.

Certe pli maljunaj gelegantoj miaj rememoras pri tiuj ĉi paroloj kaj gazetartikoloj.

Mi lernis eble mi devus skribi, mi eklernis la germanan, polan kaj rumanan lingvojn. El ili pleje mi scias la rumanan.

Laŭ mi ĉiu lingvo estas bela kaj utila. Eble pro tio oni povas elekti el ili. Estus bone ellerni ĉiom da lingvoj ekzistantaj sur Tero, sed tio ne eblas. Se politike ekblovas alia vento, tiam oni komencas lerni ĉiam novan lingvon. Nun la angla estas la favorata lingvo.

Ĉu morgaŭ eble ĝi estos la araba? - El tiu ĉi ĥaoso nur lingvolernejoj riĉiĝas.

-Ŝaŝa-



Poezio

Poeto estas tiu homo, kiu senĉese revadas kaj deziras flugi al la ĉieloj.

En la ĉieloj estas la solvo trovi la sencon de la vivo.

Efektive, kial ni vivas? Ĉu la sonĝoj iam realiĝos? Poetoj scias la respondon.

Legu poemojn kaj tiam ankaŭ ekscios, kio estas en la ĉieloj. Vi ricevos respondon, kial ni vivas.

Akceptu mian konsilon kaj fariĝu poemoleganto!



Nikolao Hohlov

Eŭropo

El nekonataj, ŝlimaj abismoj de l' animo
Mi aŭdas strangan bruon, en malgraŭvola timo,
Ĝin trapenetas krioj, kaŝitaj dum miljaroj,
Grincado de la dentoj, metalo de fanfaroj,

En ĝi stertoras veoj, lamentas ploristinoj,
Tamburas ŝmacajn hakojn falintaj gilotinoj,
Susuron flirtas flustre truita silk' standarda
Kaj ĉion fonas kraka, reeĥa boj' bombarda...

Analojn, postlasitajn de gentoj kaj prauloj,
Mi sentas en angoro tra tempoj kaj nebuloj,
Antikvaj krimoj pete al mi etendas manojn
Kaj forgesitaj lingvoj malbenas la tiranojn,

Haladzon spiras bruta, mensoga kaj maldanka
La tuta historio de mia raso blanka,
Nur kelkaj epizodoj, nur kelkaj bravaj voĉoj
Surlumas tiun muĝon de l' murdaj sangdiboĉoj,

En ili ĝermas savo, en ili – la lumturoj,
Pro ili solaj palas vizio de l' teruroj,
Nur sur iliaj ŝultroj atlantaj de l' kelkopo
Sekure kuŝas sorto de l' krimulin' Eŭropo.

Nur pro ilia sango, oferoj kaj ĉagreno
Retrovas la honoron la pala Magdaleno,
Por naski novan idon, en la feliĉaj larmoj,
Mesion liberigan de la katenaj armoj...

Aŭskultu do, Azio, mamnutristino nia,
Afriko sfinkse muta, tribar' Oceania,
Ĝemela kontinento de l' ambaŭ Amerikoj,
Kunfratoj de l' estonto kaj dumaj malamikoj.

Aŭskultu kaj konfidu la jam proksiman horon,
En kiu nova sango trafluos nian koron;
Ankoraŭ kelkaj limoj, hezitoj kaj decidoj –
Kaj kun la mirtaj branĉoj pilgrimos blankaj idoj,

Kuraci viajn vundojn kaj super la cikatroj
Trasenti la hontigan brutecon de la patroj,
Starigi novan mondon de l' paco kaj libero,
Proklami la Laboron reĝino de la tero...

Tempestras la mistikaj abismoj de l' animo,
Sed jam vidiĝas lumo en nova malproksimo;
Obee donas vojon laciĝo kaj miopo
Al kredo de l' estonto de la patrin' – Eŭropo.



William Auld

Dumnokta aviado

Silent' – krom nur mallaŭta zumo,
kiu l' orelojn ne molestas.

Obskur' – krom ke fantoma lumo
en la kajuto fosforeskas.

Senmovaj ŝvebas tuŝ-proksime
la astroj, kiel mil lampiroj.

En nova mondo mi pilgrime
flugas en voj' de l' pioniroj...



Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
XIX-a

La ekzelitoj proksimiĝis al la planedo Pluto. Estis granda silento en la kosmoŝipo. Neniu deziris babili. La gardistoj mute rigardis ilin. Certe ili jam akompanis multe da ekzelitoj kaj alktimiĝis al tiaj tragedioj.


Jes, ĝi estas tragedio. Ĝis nun ankoraŭ neniu revenis. Ili ĉiuj pereigis sur la planedo. Ne estas espero reveni.

Johano ĵetis rigardon al la onklino. Ŝi ridetis, kvazaŭ nenio estus okazinta. Eble ŝi ankoraŭ ne komprenis, kia sorto atendos ilin.

Ŝi flustris al Johano:

-Ne ĉagrenu! Baldaŭe tiu ĉi torturo solviĝos. Tiu ĉi vojaĝo estos nur malbona sonĝo. Ne timu, kara!

Li respondis nenion. Kion respondi en tia danĝera situacio. Li estas malliberulo, kiu estis kondamnita pro stultaĵo.



Johano ne komprenis, kiel ĝi povas okazi al terano. Kial oni ne savis, liberigis lin? Ĉu la Tera Centro sciiĝis pri tiu ĉi katastrofa kazo. Li sciis, tiel, ke ĉiu terano estas defendata fare de CT. Neniu rapidis savi lin. En kia mondo li vivas?


La onklino Elizabeta senĉese ridetis kaj preskaŭ en ĉiu minuto ŝi ekprovis trankviligi lin, eĉ ankaŭ aliajn ekzelitojn. El kiuj kelkaj ploris kaj panike tremis.

-Lasu min! – diris iu ekzelito al la onklino. – Ĉu vi ne komprenas, kia sorto atendos nin sur tiu damnita planedo. Antaŭ jaroj mi vidis pri ĝi filmon kaj ĝi estis terura. La ekzelitoj manĝis unu la alian. Ĉie fluegis sango kaj okazis vera hombuĉado. Baldaŭe ankaŭ tiu ĉi atendos vin. Do, ne provu konvinki min, ke ni veturos per tiu ĉi kosmoŝipo por somerumi. Se vi ne lasos vian idiotan kondukon, alveninte mi murdos vin propramane. Mi ne indulgos Vin. Vane vi lamentos kaj petegos al mi. Mi garantias, vi estos la unuaj mortintoj kun via amanto...

-Li estas mia nepo. Li ne estas mia amanto. Johano estas mia gasto veninte de sur Tero – interrompis lin la onklino.

-Ĉu li estas terano? – ekmiris la ekzelito. – Okazis granda eraro. Se oni sciiĝos pri tio ĉi sur Tero, la tiea milita komitato povos decidi pri la invado de Luno.

-Ĉu tio ĉi helpas al ni? – demandis alia ekzelito, kiu ĝis nun dormetis katenita al la seĝo. – Sur Luno erupcios milito, sed ne forgesu, ni tiam estos sur la planedo Pluto. Ankaŭ ni militos unu kontraŭ la alia. Ĉu ne? Ankaŭ la knabo vane mortos. Eble mi murdos lin por ricevi lian nutraĵpakajon, aŭ se mi estos tro malsata, tiam mi manĝegos lin kun la ĉarma onklino.



Tiu ĉi babilado ne trankviligis Johanon. Li sentis kapturiniĝon kaj li senti, baldaŭ li vomos. Eble tio estos la plej bona, se nun li tuj mortus antaŭ ol alveni la planedon Pluto.

Iu ekkriis ekscitite:

-Baldaŭ ni alvenos. Komenciĝos la batalo. Kiu estos la plej forta kaj batalema, tiu vivos plej longe. Inter ni ne ekzistos amikeco.

Liaj okuloj ekbrilis sangavide kvazaŭ li ĝuus, kio atendos ilin.

„De kie aŭ de kiu scias tiu ekzelito, kio okazos sur la planedo Pluto? Kvazaŭ li jam estus tie transvivante tiajn terurajn batalojn.” – pensis malgaje Johano.

La onklino Izabela estis trankvila plu. Sur ŝia vizaĝo ne estis vidita timo aŭ alia malbona sento. Ŝi denove flustris al Johano:

-Ne timu! Ni saviĝos kaj baldaŭ ni denove estos hejme. Kredu min, kara! Ni saviĝos kaj ni estos liberaj.


Kompreneble Johano ne kredis tion, eĉ en liaj okuloj ekbrilis larmogutoj kaj ili malrapide trafluetis sur lia pala vango.

-daŭrigota-



Saĝa knabino

-Hungara popolfabelo-



Kie estis, kie ne estis, iam vivis muelisto kaj li havis ĉarman, saĝan filinon. La knabino estis tiom saĝa, ke ŝia famo disvastiĝis tra sep landoj. Tion ĉi ekaŭdis la reĝo. Li mesaĝis al ŝi, ke en la subtegmento li havas centjaran kanabon, ĝin ŝi spinu je silka fadeno.

La knabino respondis: ŝi havas centjaran heĝobarilon, la reĝo farigu el ĝi orobobenon, ĉar kiel estus, se tiu multekosta orofadeno estus spinita per senvalora lignobobeno.

La respondo plaĉis al la reĝo. Li mesaĝis al ŝi, li havas truan kruĉon en la subtegmento, ŝi ŝtopu ĝin, se ŝi povas.

La knabino trankvile respondis: la kruĉon li inversigu, ĉar eĉ ŝia avo ne aŭdis, ke io estu ŝtopita sen inverso. Tiu ĉi respondo pli bone plaĉis al la reĝo. Nun li mesaĝis al ŝi: la knabino venu al li, sed ŝi venu, eĉ ne, ŝi salutu lin, eĉ ne kaj ŝi portu donacon, eĉ ne!

Por plenumi la deziron la knabino petis de sia patro la azenon. Ŝi eksidis sur ĝian dorson, tiel ŝi iris al la reĝo. Hejme ŝi kaptis kolombon, ĝi estis metita inter du sitelojn kaj tiel ŝi portis la kolombon.



Alveninte la reĝon, ŝi diris nenion, ŝi riverencis antaŭ li kaj poste ŝi liberigis la kolombon el inter la siteloj. Tiel ŝi venis, eĉ ne, ŝi salutis lin, eĉ ne kaj ŝi portis donacon, eĉ ne.

La reĝo tuj enamiĝis al la knabino kaj li edzinigis ŝin.

Ili feliĉe vivis ĝis la tombo. Kiu ne kredas tion ĉi, tiu demandu mian avon, ĉar li renkontis tion pri la saĝa knabino.

-El la hungara lingvo tradukis: Apáti Kovács Béla-



Ludmila Jevsejeva

(1913-1980)

MUR-HORLOGHO

Tage kaj nokte
Ĝi iras kaj iras,
Tamen el hejmo
Nenien for-iras :
Tik-tak, tik-tak !
Se oni zorgas
Pri mi akurate,
Mi eĉ la horojn
Aŭdigas son-bate :
Bim-bom ! Bim-bom !



Belaj pejzažoj

Belaj pejzažoj

